Raportoj pri la Verdaj Partioj - AVENO 35 - 2010-06-25

Kauzoj por la **malbona baloto-rezulto** de de Verda Partio (SZ) en **Chehhio:**
(el detala raporto de la chehha oficejo de Fonduso Heinrich Boell en Prago):
1. SZ estis en nestabila registaro kiu estis faligita - helpe de 2 verdaj vochoj - dum la tempo kiam chehhio prezidis la EU-Konsilion. Krome inter la SZ dum tiu tempo regis malkonsento, malgrau bona laboro de la verdaj ministroj.
2. Jam por la antauaj balotoj al distriktoj kaj EP ili ne ricevis sufiche da vochoj.
3. La enketoj antau la baloto auguris, ke SZ ne superos la bezonotan 5%-sojlon, kaj tial ili ne ricevis la eblecon partopreni la amas-mediojn kaj TV-diskutrondojn.
4. Estis polarizo kaj potencialaj verd-balotantoj preferis vochdoni sukcese kontrau la ChSSD.
5. La verda programo estis taksita bone, sed restis la demando, chu tiu-chi povus esti realigota.
Tamen kelkaj verduloj ricevis bonajn rezultojn kaj montrighis ke en Prago inter la sub-30-jaruloj estis sufiche alte simpatio por la SZ kaj la kandidatino Olga Sommerova. Kaj pluraj intelektuloj, inter ili Vaclav Havel, subtenis la SZ. Ondrzej Lishka diris ke SZ daurigos la laboron, kunlaboros kiel antaue kun NRO-oj kaj partoprenos la komunumajn balotojn je autuno 2010.
Do, mi (AVE) esperas ke iu el la chehhaj AVEanoj kunlaboros (prefere kiel membro) kun ili, por ke SZ rimarku la potencialon de Esperanto por la internacia kunlaboro.

Aveno 2010-05-29

**Europa Verda Partio** - el la "EGP Update 2010-05-22"
La Verda Eŭropa Fonduso (VEF/GEF) enkondukis du novajn eldonaĵojn kiel parto de ĝia serio "Verda Nova Konsento" kadre de ĝia lasta Ĝenerala Asembleo je la 10a de Majo. Kiel ĉiuj eldonaĵoj de VEF ankaŭ la du tekstoj "Verda Nova Konsento et réponse européenne à la crise" kaj "Daŭrigebla Industria Politiko por Eŭropo" estas deŝutebla de la fondusa retejo www.gef.eu.

Verda Partio de **Usono**: http://www.gp.org
En la kunteksto lia parolado ĉe Radio City (New York), Dalai Lamao klare agnoskis ke la Verda Partio estas la partio de senperforto, ekologio, homaj rajtoj kaj liberoj, kaj bazaj valoroj de sociala justeco kaj ekonomia justeco. Ĉi tiuj valoroj inkluzivas demokration kaj memdeterminadon por homoj tutmonde, inter kiuj estantaj Tibetanoj," diris Mike Feinstein, kunprezidanto de la Verda Partio de Usono. "La Dalailamao ŝajne ne sciis ke ni havas kreskas Verdan Partion ĉi tie en Usono. Kaj eble pro iuj "bonaj" kialoj, kiel la emo de amaskomunikiloj limigi politikajn raportojn al la mallarĝan elekton inter Demokratoj kaj Respublikanoj. Aŭ pro la baranta kaj kontraŭdemokrata baloto-aliraj reguloj aprobitaj en multaj ŝtatoj por malhelpi triajn partiojn kaj ties kandidatojn", Sro. Feinstein almetis.

**Brazilo:** Ekologiistino **Marina Silva** (52) aliĝis al la Brazila kurado por la prezidenteco kiel kandidato por la malgranda Verda Partio, kaj promesis puran regadon kaj daŭrigeblan evoluon. Ŝi naskiĝis en familio de kaŭĉuko kolektantoj ´kaj nur lernis legi kaj skribi kiam ŝi estis 16 jara kaj laboris kiel domservistino. Ĉe partia kongreso en la periferio de Rio de Janeiro, Silva promesis antaŭenigi daŭrigeblan ekonomian evoluon kaj batali kontraŭ socia maljusteco kaj korupto. "Ni jam havas multe de la teknikaj respondoj por nutraĵo-, edukado- kaj loĝejo-problemoj - sole mankas etika sindevontigo".
Proponante biciklon vojojn, akvopurigejojn kaj pli verdajn agrikulturo-teknologiojn, Silva diris, ke ŝi estas same motivata kiel ŝi estis kelkaj jardekoj antaŭe kiam ŝi laboris apud la legenda ekologiisto Chico Mendes. Silva, kiu 2008 eksiĝis de sia posteno ministro pri la medio ĉar ŝi fariĝis ĉiam pli izolita kiam Prezidanto Luiz Inacio Lula da Silva-a subtenis biofuelon, genetike modifitajn organismojn kaj atomenergion. Ŝi promesis daŭrigi ekonomiajn politikojn kiu alportis al Brazilo ekonomian kreskon kaj stabilecon en la lastaj jaroj, kiel inflacio-limigon, flekseblan valuton kaj fiskan disciplinon por redukti publikan ŝuldon.
Malriĉeco-elimino kaj investoj en socian helpon nur eblas kun ekonomia stabileco kaj inflacio-limigon, ŝi diris, kaj anoncis ke ŝia vicprezidenta kunkandidato estos riĉa komercisto Guilherme Leal, posedanto de la granda firmao por kosmetikaĵoj Natura.

La **Tutmonda Verdpartia Kunordigo** reprezentanta pli ol 80 verdajn partiojn el la tuta mondo, salutas la ekbolantan kampanjon por la okazontaj prezidentelektoj en **Kolombio** de la Verda Partio kaj sia kandidato Antanas Mockus. http://www.partidoverde.org.co
Ankaŭ en Wikipedia: Partido Verde (Kolombio)

**Taipei**: Vizitantaj parlamentanoj de la Luksemburga Verda Partio eldiris ilian subtenon por ke Tajvano partoprenu je la Kadrokonvencio sur Klimata ŝanĝiĝo de la Unuiĝintaj Nacioj (UNFCCC) kiel lando kaj ankaŭ alvokis al Tajvano sekvi la Eŭropan klopodon al verda evoluado.
Ili ankaŭ alvokis por ke Tajvano restarigu efektivan moratorion sur la mortopuno post la ekzekutado de kvar mortpunigitaj prizonuloj je Aprilo 30a.

Paroladon de la estro de la **Albana Verda Partio** en protesto:
La Verduloj estas tie ĉi hodiaŭ kune kun vi por esprimi la solidarecon kaj doni sian subtenon al la Membroj de la Albano Parlamento kaj ankaŭ al aliaj civitanoj, kiuj komencis malsatstrikon. ..
Ĉi tiu striko okazis en la nomo de nobla afero, favore al demokratio kaj libero je voĉdona elektado, en la nomo de ĉiuj Albanianoj kiuj revis havi eŭropan Albanion, kiu havas kiel ĉefa aferon la transparencon en la voĉdonado. ..
Gefratoj, se ni estas indiferentaj al la libera voĉdonado HODIAŬ, tio signifus ke ni neas por niaj infanoj la rajton je elektado MORGAŬ. Estas ilia rajto determini sian estontecon. Permesu al ili la ŝancon loĝi en eŭropa, demokratia Albanio, en evoluigita Albanio kun pura medio, sen karbocentralo kaj termonukleaj elektrocentraloj.

2010-05-16 La Verda Partio de **Svedio** (Miljöpartiet) okazigis sian partio-kongreson en Uppsala norde de Stokholmo. La delegitoj adoptis la balotadan platformon.
Per Gahrton, la malnova dojeno de la Verda Partio kaj prezidanto de la verda esplorinstituto Cogito, asertis ekzemple, ke ja la komuna platformo kun la aliaj partioj estas kompromisa produkto, sed la propra balotada programo devas montri kion efektive ili volas fari se ili povus. Tio estas la sola vojo al ili por fari kompromisojn sen perdi la spuron de ilia verdaj animo kaj radikoj, li diris.
Entute la verda programo havos 36 paragrafojn en sia balotada programo, ekzemple:
* La norma labor-semajno estos tridekkvin horoj anstataŭ kvardek. La aĝo de emeritiĝo estos pli fleksebla.
* Svedio ne aliĝu al la EMU (Eŭropa Monetara-Unio), kaj la EU devus esti malcentralizita kaj ne aliru al komuna defendo-politiko
* La publika transporto estu ampleksigota.
* Imposto je transportado per aŭtomobiloj por pli favorigi transporton de varojn trajne kaj boate.

**Irlando**: La Ministro pri medio promesis instali pli ol 50 lokojn trans Irlando dediĉitaj por la protekto de vivejo (habitato) kaj la faŭno. John Gormley, la Prezidanto de la Verda Partio diris ankaŭ ke li baldaŭ intencas riveli kiel la lando difinos la Internacian Biologian Diverseco-Semajnon, ekde Majo 21.

Informojn pri la **Finna atom-reaktora** situacio, de Satu Hassi:
- Novaj atomreaktoroj ne bezonatas por hejmlanda elektro-konsumo, kiu signifas ke la reaktoroj estus konstruotaj por elektro-eksporto (do, nerekta import de atomaj restaĵoj)
- Speciala komerca modelo por la atomenergio-firmaoj, la laŭleĝeco de ĉi tiu modelo estas dubinda.
- Fotoj de kontraŭatoma manifestado je la 8a de Majo en Helsinkio:
http://www.henriettamediat.fi/galleria/fin_gr.html

Verda Partio en **Grekio** / Oikologoi Prasinoi volas:
- Malakcepti la mekanismon de la Eŭrozono-IMF Subtenadon.
- Insisti, ke alternativoj sur bazo de la Giegold Raporto adoptita de la Eŭropa Parlamento,
- Forlasi la ne sukcesan politikon, kiel vetarmado, faraonaj projektoj, kaj la "facila mono" heredaĵo sekve de la 2004 Olimpikaj Ludoj .
Deklaro, unuanime adoptita de la Nacia Konsilio de la Grekaj Verduloj, emfazis:
* La ekologiajn riskojn de la IMF "kreskada" politiko, kiel senbrida minado-projektoj interalie per-cianida oro minado, fermon de la plimulto de la (nun tre malprofita) Greka fervojaro, evoluado de publika areo rezervata por verdaj spacoj en Ateno kaj aliaj urbegoj. * La neceso samtempe pritrakti la krizon socie, ekonomie kaj ekologie, pere de vasta investo laŭ la Verda Nova Konsento, kaj fortigante la sektoron de Socia Ekonomio kiel sav-reto kontraŭ malriĉeco, kaj ekskludante malaltajn salajrojn kaj pensiojn de la aranĝoj redukti la deficiton.
Kompleta resolucio de EVP: http://www.ecogreens-gr.org/Docs/crisis_apofasiPS_EN.doc

Gazetara komunikaĵo, **Bratislava**, La 17an de majo 2010
La Federacio de **Junaj Eŭropaj Verduloj (FYEG)** okkazigis sian Ĝenerala Asembleo inter la 12a kaj 16a de Majo en Bratislava, kun reprezentantoj de membro-organizaĵoj el ĉiuj partoj de Eŭropo. Reprezentantoj, adoptantis diversajn poziciojn i.a. pri COP15 (Kopenhaga Klimato Konferenco) kaj la Rajtoj de Bestoj
(el EGP Update/Ĝisdatigo 2010-05-22 - fino)

Aveno 2010-05-15
La Verda Partio en la **germana** lando **Nordrejn-Vestfalio** ricevis duoble da vochoj, kaj esperebl tio gvidos al re-shangho en la germana federacia politiko, kiu celis dank al Liberaluloj kaj Kristandemokratoj ege plidaurigi la atomcentralojn, malgrau la konsento kun la rugh-verda registaro antau 10 jaroj, kiu signifas limigitan funkciado-dauron al ch. 30 jaroj.

Se vi ankorau ne vizitis: jen la ligo al "**100 Bonaj Argumentoj kontrau la Atomenergio**":
http://www.verduloj.org (tuj maldekstre trovighas la ligilo)

UK 2010-05-06 UK (Unuighintaj Reghlandoj):
**Caroline Lucas**, MEP, presidanto de la Verda Partio en Anglio kaj Kimrio, ighis la unua rekte elektita membro - de Brighton - de la Verda Partio en la UK-Parlamento.
For more information on the campaign go to Caroline's website:
http://www.carolinelucas.com
e-mail: alex.phillips@brightonandhovegreenparty.org.uk
La Verda Partio staras, krom por ekologia ekonomio, por justa lineara balotoproceduro.

Novelektita - kiel la unua Verda parlamentanino en la **britan parlamenton Caroline Lucas** rezignos pri sia sido en la EP; shia posteulo tie estos Keith Taylor.

Aveno 2010-04-27
Gratulon al Hungara Verda Partio, LMP, ricevis 7,5% kaj nun havas 16 seghojn en la parlamento.
(EGP Update (Europa Verda Partio) 2010-04-27)
kaj krome al

**ECO.uz**, la **ekologia frakcio** en la parlamento de **Uzbekio**, kiu ricevis lau ordono de la prezidento 15 seghojn kaj la elekto okazis inter diversaj NRO-oj kaj ECO mem, kiu estas tegmenta organizajho de ekologiaj NRO-oj en Uzbekio.

Dum sia 4-a Kongreso, **Pola Verda Partio** - Zieloni 2004 (= Verduloj) - http://www.zieloni2004.pl/news.htm elektis novajn aŭtoritatojn. Kunprezidanto plu estas Dariusz Szwed, sed je la posteno de kunprezidantino Agnieszka Grzybek estis anstataŭigita de Malgorzata Tkacz-Janik.
La Kongreso rezoluciis ankaŭ kvar programajn dokumentoj - pri la elekta ordinacio, prioritatoj de socia politiko, saneca politiko kaj eduka politiko. Dum la kongreso okazis i.a. debato pri eŭtanazio.
Amike, Paweł Fischer-Kotowski, Pollando

AVENO 2010-02-19
Alvoko de **Ekologio-Europo (Les Verts & aliaj**) , la **franca** grupo en la Verda/Regionalista Frakcio - anoncis - ankau en Esperanto sur la ilia oficiala pagharo:
http://aquitaine.regions-europe-ecologie.fr/signez-l-appel/2066-ekologio-konkeru-akvitanion/

**Verduloj vochdonis kontrau la EU-Komisiono:**
Ili ne estis konvinkitaj chu la Komisiono taugas por la grandaj ekonomiaj, soci(al)aj kaj ekologiaj defioj.
El la kauzoj: Barroso ja provis urghe decidi la **SWIFT**-traktaton antau la lau-legha partopreno de la Parlamento, kiu donas Usonon la plenan enrigardon al chiuj bank-transpagoj ech ene de EUropo.
Komisaro Barnier (Interna Merkato) intencas daurigi la privatigon de la publikaj provizoj de akvo. Kallas (Trafiko) tute ne rimarkis ke trafiko ankau rilatas al la klimata minaco.
Sed estas ankau bonaj ekzemploj: Hedegaard (Klimato) montris, ke shi forte aktivos por bona klimato-politiko.
Oettinger (Komisaro pri Energio) promesis prioritaton al la **regajneblaj energioj,** sed kiel chef-ministro en Baden-Wuerttemberg li ne troe aktivis en tiu direkto - lia partio (CDU) ja preferas daurigi la atomenergion.
(Lau Heide Rühle, MEP Verduloj, 2010-02 en Europa Verda Partio - Novajhoj)

2010-04-30/05-02, **Taipei: Konferenco de la Aziaj-Pacifikaj Verdaj Partioj.**
Post la Kongreso 2005 en Kyodo ili renkontighos por komun agado, invitita de la Verda Partio de Tajvano.
http://www.greenparty.org.tw/
Se iuj el la AVE-anoj pretas partopreni - bonvolu informi min, por tie komune anonci diskut-rondon pri la lingvaj problemoj.

AVE okazigis kunsidon okaze de la Azia Esperanto Kongreso en Ulan Bator 2010-Junio.
Vidu la raporton sub "Agado" - dank' al Mirejo Grosjean.